


BONA ESPERO



Cirkulero 54

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

prezidanto: Otto Nelken,

Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, telefono+fakso: +49-(0)2902/57460

retadreso: u.nelken@t-online.de

Warstein, 2000-04-10

Karaj amikoj kaj subtenantoj,

Ursula Grattapaglia skribis je la 20a de mardo al vi:

„Rekte el la tropika somero venas al vi nia saluto!

La cirkulero estas tradicie verkita en Germanio, kaj kial ne, ĉi-foje vi ricevos ĝin rekte el Brazilo.

„Nenio okazas, sen komence esti revo.“

Jes, karaj amikoj kaj subtenantoj de“niaj revoj kaj realigoj“, ni daŭre kaj entuziasme luktas por plibonigi nian homaranisman servon favore al multaj gejunuloj. Kaj feliĉe ni fartas bone, laboras harmonie sen troaj problemoj danke ankaŭ al la garantio de via financa kunlaboro por ĉi tiu jaro 2000.

Nun kelkaj simplaj novaĵoj, ne mondskuaj, sed vi ja volas scii pri nia ĉiutaga vivo...

La rezulto en la kampo de edukado ĝenerale ne estas tuj videbla. Sed nun ni povas ĝoje informi vin, ke tri eks-bonesperanoj frekventas universitatan kurson. *Adarci* studas historion en Formosa (ĉiun duan semajnfinojn), *Tota* administradon ĉiunokte en Brasilia kaj *Edith* pedagogion Waldorf (antropozofio) unufoje monate en Sao Paulo. Se oni konsideras la devenon de la tri, oni eĉ ne povus imagi ke ili alvenus iam al supera edukiteco.

Du grandaj veturiloj de la urbestro ĉiutage transportas niajn lernantojn al la tri urbaj lernejoj tagmeze kaj reportas ilin vespere.

En la urba domo restas la grandaj knabinoj, pri kiuj *Adarci* zorgas.

En la bieno *Maria* kaj *Rosamira* kiu ankaŭ finis sian porinstruadan kurson en decembro, kunlaboras aktive zorgante pri la novaj tre malfacilaj infanoj. *Maria* posttagmeze instruas en la urba lernejo, akompanante la veturadon de ĉiuj infanoj, sed vivas kun ni en la bieno kaj administras la kuirejon.

El Finnlando venis volontulino, kiu brile instruas esperanton per rekta metodo al malgrandaj grupoj de niaj infanoj kun surpriza sukceso. Kiel sperta uzanto de komputiloj *Salme Tiili* ankaŭ instruadas al la granduloj la sekretojn de komputilo. Bedaŭrinde nia aparato estas tre maljuna, ofte meze de iu teksto, malsaniĝas, devas ripozi kaj nur post kelkaj horoj denove pretas labori. Kiel bele estus, se ni povus aĉeti tute novan komputilon!

Pasintjare en Bona Espero trejniĝis tri profesiaj instruistinoj el la sudo de Brazilo por pliperfektigi en Esperanto. Grava industriisto, esperantisto (liaj 1100 laboristoj produktas monate 53.000 gasformojn eksportitaj al 20 landoj) pagis por la tri ĉiujn vojaĝelspezojn. Nun ili instruas esperanton al la gefiloj de la laboristoj en la lernejo de la urbo Pato Branco (ŝtato Paranao). Kompreneble Bona Espero ricevis donace tri belajn fornojn, post la vizito de la sinjoro kun sia familio.

Venontmonate ni atendas la viziton de *d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof*, kiu estos omaĝota en la deputita ĉambro de la Federacia Distrikto en Brasilia. Ankaŭ la pola ambasadoro donos honoran akcepton al ducent esperantistoj kaj vizitos Bonan Esperon. Venontan semajnfino ni organizos Esperanto-renkontiĝon en Bona Espero kun tuta aŭtobuso de esperantistoj el diversaj urboj. Niaj infanoj prezentos muzikojn kaj teatraĵon en Esperanto (La „vendistino de revoj“ de Beaucaire).

La grupo de infanoj ĉi-jare multe ŝanĝiĝis: la grandaj 17- kaj 18jaraj komencis vesperlernadi kaj labori en Colinas, Formosa, Brasilia kaj Cavalcante. Ankaŭ la familia situacio de *Silvana*, *Denes*, *Tidete*, *Regina* kaj *Renato* pliboniĝis kaj la patrinoj nun povas zorgi por ili.

Luciene kaj *Maria Regina* estas granda defio por ni, ĉar iliaj gepatroj mortis pro alkoholismo; en la aĝo de 11 kaj 12 jaroj la knabinoj ankoraŭ ne kapablas legi. Ni savas ilin de la strato, ĉar la fratino 13jara (analfabeto) jam havas bebon, naskita en novembro, konsekvenco de la fakto, ke ŝi konas intime dekojn da viroj.

Joelice, 14jara, mensmalforta, problemlena, ne antaŭvidebla konduto, venis rekte de la juĝisto kaj por ni estas grava respondeco zorgi pri ŝi.

Rafael, *Suzana* kaj *José* estas gefiloj de instruistino en kampara lernejo ie en la regiono de Cavalcante. La patrino instruas ĝis la 3-a klaso, mem studis ĝis la 5-a. Nun la tri kursas la 4-an klason sed ilia preparo estas treege nesufiĉa kaj *Rosamira* devas matene kaj vespere doni ekstrajn lecionojn.

Donaco-konto:

Konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)

La adreso de la kasistino:

Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, Tel.: +49-(0)2904 - 6417

Vania kun la gefiloj kantis dum karnavalo belegajn oper-ariojn en Bona Espero antaŭ pli ol 50 personoj. En la sama vespero la edzo kaj patro Adalmo akcidentis per sia motociklo kontraŭ sovaĝa ĉevalo kaj mortis.

Tradicie nia Kristnaska Festo kunigis multajn homojn: lernantojn, familianojn, malgrandajn gefratojn, ekslernantojn, eksvolontulojn, donacinton, najbarojn, instruistojn kaj la prezentitaj teatraĵoj kiel ĉiam estis sincere emociaj.

Vi povas konstati, karaj, ke nia vivo estas kampare trankvila, ni vivas kun malfermitaj pordoj, serpentoj malmultas, la epidemio de flava febro en januaro feliĉe ne atakis Bonan Esperon sed nur la hotelojn de la regiono – neniu turisto kuraĝis alveni, nur nun post miliona vakcinado homoj alvenas iom post iom kuraĝe. Se do iu el vi internas viziti nin, vakciniĝu!!! Per ĉiu rekomendo la bonesperanoj salutas vin kore kaj amike ĝis la venonta fojo!“

Ĝis tie la raporto de Ursula pri la malfacila sed ankaŭ tre pozitiva vivo en Bona Espero en laŭvorta kaj ne mallongita redakto. Rilate al *Vania* oni ankoraŭ kompletigu, ke ŝi plue donas sukcesege lecionojn en instrumenta kaj kantmuziko al la infanoj, kompreneble – kiel ĉiam - senpage.

Fine ni bedaŭrinde devas aldoni al la multaj pozitivaj informoj tre afliktan sciigon: La firme planita kaj precize preparita transmigrado de la familio Passarella en la infanbieron ĉi-somere ne okazos! Reveninta el Brazilo, Jean P. grave malsaniĝis intertempe, kaj post ne mallonga hospitala restado li devas submeti sin al regula longe daŭra kuracista kontrolado. Post longtempa doloriga zorga konsidero la familio Passarella tial decidis kun peza koro, ĉesi sian novan vivplanadon pro sanaj motivoj kaj resti en sia hejmlando. – Kaj post tiu por ĉiuj partoprenantoj gravega decido en tiu afero la problemo de la estonta transpreno de oficio por Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia bedaŭrinde denove estas tute nesolvita! Ni nur povas deziri al ambaŭ plue multan sukceson ĉe la peniga kaj admirinde sukcesa laboro, kiu estas akompanita de tiel multaj necertoj kaj malsukcesoj, kaj esperi pri kontentiga, baldaŭa solvo de la malfacila problemo por ili same kiel por la infanoj.

Ĉe la fino ni ŝatas kore saluti ĉiujn novajn membrojn kaj subtenantojn. Al ĉiuj „malnovaj“ ni dankas samgrade pro iliaj same necesaj kaj efikaj subtenoj en diversa formo kaj petas vin ankaŭ plue por ĉi-tiuj.

Nome de la tutestraro mi deziras al vi belan paskan feston!

Otto Neel



Donaco-konto:

Konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)

La adreso de la kasistino:

Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, Tel.: +49-(0)2904 - 6417